45a Jaro - N-ro 1a - Februaro 1953

# BELGA ESPERANTISTO

Ĉefredaktoro :
Maur. JAUMOTTE
Avenuo De Bruyn, 44
Wilrijk-Antverpeno

DUMONATA REVUO, OFICIALA ORGANO
DE
REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA
Asocio sen profita celo,
aliĝanta al UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO
Socia Sidejo : 106, rue Général Lotz, Bruselo



La malnovaj gildodomoj sur la Granda Placo en Antverpeno,
urbo de nia Beneluksa Esperanto-Kongreso.

**REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA**

106, rue Général Lotz, Bruselo

— ASOCIO SEN PROFITA CELO —

Statutoj : *Moniteur Belge - Belgisch Staatsblad*, n-ro 115, 27 Junio 1936.

HONORA KOMITATO

S-ro Frans VAN CAUWELAERT,
Prezidanto de la Deputitaro.

S-ro J. VAN HOUTTE,
Ĉefministro, Deputito.

S-ro Achille VAN ACKER,
Eksĉefministro, Deputito.

S-ro Robert CATTEAU,
Vic-Prezidanto de la Senato, Skabeno de Bruselo.

S-ro Lode CRAEYBECKX,
Urbestro de Antverpeno, eksministro, Deputito.

S-ro Georges MAZEREEL,
Senatano.

S-ro Georges MICHELET,
Honora Direktoro de la Komerca Ĉambro de Bruselo.

BELGA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA

45a Jaro — Februaro 1953 — N-ro 1a

# Post la Subakvigoj

En la nokto de la 1a de februaro, terura uragano okazinta je epoko de escepte altaj tajdoj, kaŭzis gravajn detruojn en la malaltaj regionoj de nia lando, precipe en la provincoj de okcident- kaj de orient-Flandrio kaj de Antverpeno.

Laŭ nia scio, neniu el nia membraro kaj legantaro funebras pro la morto de karulo, sed kelkaj perdis, en tiu nokto, parton de sia havaĵo.

Al ili ni prezentas la esprimon de nia plej sincera kunsento, kiun la Prezidanto de Belga Ligo cetere havigis, tuj post la okazintaĵo, al la prezidanto de « La Verda Stelo ».

Sed la malfeliĉo de kelkaj el niaj samlandaj samideanoj, ne povas forgesigi al ni la sorton multe pli dolorigan de niaj amikoj en Nederlando kaj en Britujo.

Al ili, ni speciale volas sendi saluton de simpatio kaj de solidareco. Ke la multaj pruvoj de kunsento, kiujn ili ricevis kaj ankoraŭ ricevos el la rangoj de la esperantistaro, estu por ili kuraĝigilo en la momento de la restarigo kaj de la rekonstruo.

Maur. JAUMOTTE.

# UNESKO kaj Esperanto

Sub tiu titolo en la antaŭa kajero la Ĉefredaktoro de « Belga Esperantisto » klarigis al la legantoj la gravecon de la demando, kiun la Generala Konferenco de UNESKO devis solvi, rilate al la lingvaj malfacilaĵoj inter la popoloj.

Precize kiam la gazeto estis presota, mi ricevis de D-ro Lapenna ampleksan raporton el kiu mi eltiris tekston, kiun S-ro JAUMOTTE sukcesis enŝovi sur paĝon 77an de la gazeto.

Nun mi ricevis sciigon ke siavice la Generala Konferenco de UNESKO, dum sia kunsido de la 11a de decembro, voĉdonis la tekston proponitan de la Svisa delegitaro en iom pli mallonga formo :

« La Generala Direktoro estas rajtigita komuniki al la ŝtatoj-membroj la
» Internacian Petskribon favore al Esperanto, kiu estis prezentita al la Unui-
» ĝintaj Nacioj kaj transdonita fare de tiu organizaĵo al UNESKO, kaj entre-
» preni, surbaze de informoj ricevotaj, la necesajn preparlaborojn por ebligi
» al la Generala Konferenco decidi dum ĝia Oka Kunveno, pri la agoj farotaj
» je tiu ĉi Petskribo. »

Kion signifas tiu decido ? Ĝi signifas unue ke la Petskribo — por kiu la belgaj esperantistoj tiom laboris — oficiale estos konigata al la Ŝtatoj, membroj de UNESKO. Estas memorigite ke la Petskribo estis transdonita de la Sekretariaro de UNO al la Sekretariaro de UNESKO, sed nur kiel dokumento, sen iu devigo al tuja esplorado kaj pritraktado.

La decido signifas due ke la Sekretariaro devos, surbaze de la informoj ricevitaj, kunmeti raporton prezentotan al la Oka Generala Konferenco, okazonta en 1954 en Montevideo.

La decido signifas trie ke Esperanto, — **kaj nur ĝi,** — estos la temo de la raporto.

Tiu decido estas pli favora ol tiu kiun ni celis — (Temis nur pri asigno de Budĝeto por pristudo de la problemo de la lingvaj malfacilaĵoj).

Ĝi estas granda sukceso, kiun ni ŝuldas al la persista laboro de U.E.A., de la landaj asocioj kaj de la esperantistoj saĝe kaj energie gvidataj de la Centro de Esploroj kaj Dokumentado de U.E.A., kaj speciale de ĝia Direktoro, P-ro I. LAPENNA, kiun mi tie ĉi volas danki kaj gratuli.

Li estis en Parizo dum la Konferenco kaj senlace batalis kontraŭ ĉiuj malhelpoj, kiujn li devis superi.

Plej gravan paŝon faris la svisa delegitaro, kiu kuraĝe proponis la rezolucion. La honora prezidanto de U.E.A., D-ro E. PRIVAT sukcesis, per sia persona agado, persvadi ĝin fari la proponon.

Cetere, dank'al la informoj donitaj kaj al la paŝoj faritaj de ni, la belgaj delegitoj al la Konferenco voĉdonis la decidon.

Tiu granda sukceso devas inciti nin persiste labori por nia afero. Ni uzu ĝin kaj konigu ĝin, ĉu pere de la gazetaro, tradukante la rezolucion kaj enmanigante ĝin al la ĵurnalistoj de ni konataj, ĉu en ĉiutagaj konversacioj kun niaj amikoj kaj konatoj. Tiu sukceso preparas novajn, se ni ĝin bone eluzas.

Kuraĝe, antaŭen !

D-ro P. KEMPENEERS,
Vic-prezidanto de U.E.A.

* * *

Ampleksaj raportoj pri la afero aperis en « Esperanto » (januaro 1953). Estas konsilinde ilin atente legi. Ni citas la lastan paragrafon de la artikolo de D-ro Lapenna :

*« Al mi persone la Konferenco ankoraŭfoje*
*» klare montris kiom grandega, potenca kaj*
*» nobla estas la afero, por kiu ni ĉiuj luktas.*
*» Ni portu kun fiero nian kvinpintan verdan*
*» stelon kaj ni tenu alte nian kapon, ĉar*
*» nia celo estas pli ol justa kaj niaj vojoj*
*» estas ĝustaj. Ni devas sendube ankoraŭ*
*» multe batali kontraŭ ĉiaspecajn antaŭjuĝojn, nescion, ignoradon. Sed, ni povas esti*
*» konvinkitaj pli ol iam, ke tute certe venos*
*» la tempo, kiom la estontaj generacioj estos*
*» dankemaj al ni pro la laboro, kiun ni nun*
*» faros por ili. »*

El la organo de niaj Svedaj samideanoj, ni ĉerpas tiun ĉi konkludon de artikolo skribita de S-ro E. Malmgren, Prezidanto de U.E.A.

*« Ankoraŭ estas tro frue imagi al si la sekvojn de la decido en Unesko. Sed pri tio mi estas certa : nome ke nun atendas nin periodo, kiu postulos de ni multe da entuziasmo kaj energio, por ke ni povu montri al la venonta ĝeneralkunsido de Unesko, ke Esperanto estas vere vivanta lingvo, uzata ĉie en la mondo, utiligata en literaturo, scienco, komerco, turismo kaj instruata en multaj universitatoj kaj lernejoj. »*

## JARLIBRO DE U.E.A. 1953 :
### Unua parto.

Jus aperis la unua parto de la Jarlibro de U.E.A. por 1953. Tiu do tre akurate aperinta parto estas neaĉetebla, sed ricevebla nur de individuaj membroj de la Asocio, kaj enhavas, kiel kutime, la nomojn de la delegitoj, libroliston, adresojn de eldonejoj, de la akademianoj, liston de la universalaj kongresoj, de la fakaj asocioj k.t.p., kiu trafos la aprobon de ĉiuj uzantoj, la informoj pri la esperantistaj aranĝoj en 1953 kaj la indekso.

Unufoje pli, tiu volumeto tre praktika pruvos, pli bone, ol longaj paroladoj, la efikecon de nia lingvo.



# Beneluksa Esperanto-Kongreso

Oficiala Komuniko n-ro 2.

En modela kunlaboro, la L.K.K.-anoj, membroj de la tri koncernaj Esperanto-Ligoj, ellaboris definitive diversajn punktojn de la programo de la Beneluksa Esperanto-Kongreso, kiu okazos en Antverpeno, la 23an, 24an kaj 25an majo 1953a.

Pasintan semajnon, la L.K.K. faris la necesajn aranĝojn por ke ni disponu, por okazigi la diversajn programerojn, pri tuta konstruaĵo kun luksaj salonoj en plena centro de la urbo. Tiamaniere la kongresanoj estos ĉiam sufiĉe proksime al siaj hoteloj kaj ne perdos tempon trairante aŭ traveturante tutan urbon.

Jen koncize la programo de la kongreso :

**Sabaton :** Jarkunsido de Belga Esperanto-Instituto.
Jarkunsido de Flandra Esperanto-Instituto.
Gvidata promenado tra Antverpeno.
Laborkunsido de Reĝa Belga Ligo Esperantista.
Ligestrarkunsido de Flandra Ligo Esperantista.
Kultura Horo (1).
Oficiala malferma kunsido de la Beneluksa Kongreso.
Granda Kongresa Balo.

**Dimanĉon :** Diservoj por Katolikoj kaj por Protestantoj.
Solena Kunsido de Reĝa Belga Ligo Esperantista.
Jarkunsido de Flandra Ligo Esperantista.
Laborkunsido de « La Estonto estas Nia ».
Akcepto de la Urbestraro.
Oficiala Fotografado.
Komuna Tagmanĝo (Prezo : Bfr. 75, trinkmono enkalkulita).
Dua Laborkunsido de L.E.E.N.
Agrabla posttagmezo.
Komuna Panmanĝo (Prezo : Bfr. 45, trinkmono enkalkulita).
Festvespero kun la kunlaboro de la tri Ligoj.

**Lundon :** Tre varia ekskurso.

En nia proksima komuniko, ni publikigos la kompletan programon, kun la ekzakta horaro. Ni aldonas al la nuna numero la oficialan aliĝilon kaj insistas por ke niaj membroj TUJ ĝiru sian kongreskotizon de Fr. 50, al P.Ĉ.K. N-ro 3766.98 de « Belga Esperanto-Kongreso », Antverpeno.

H. SIELENS, Sekretario.
M. JAUMOTTE, Prezidanto.

---

(1) **ORATORA KONKURSO**

Ĉiujare dum la nacia Kongreso, nia Ligo okazigas oratoran konkurson, al kiu povas partopreni ĉiuj gejunuloj ĝis 28-jaraj.

Kiel temo ĉiam estas elektata tiu akceptita por la Universala Kongreso de la sama jaro.

Ni nun ekscias ke la temo por la Universala Kongreso en Zagreb estos : « **La rolo de Esperanto por la internacia proksimigo de la junularo** ». Ĝi do ankaŭ estas tiu de nia konkurso. Ĉiuj gejunuloj sin preparu !

# Rega Belga Ligo Esperantista, a. s. p. c.

## FONDAĴO JENNEN KAJ PREMIO POR GRUPO

Sub tiu ĉi titolo ni anoncis en la lasta numero de pasinta jaro, ke estonte la premio, akirebla de la « Fondaĵo Antoinette Jennen », estos donacata, dum la nacia Kongreso, al la grupo, kiu dum la antaŭa jaro estos akirinta la plej altan procenton en la konkurso intergrupa pri plialtigo de la membraro de Reĝa Belga Ligo Esperantista.

Jen nun la rezultato akirita de la diversaj grupoj dum la jaro 1952a :

| Grupo de : | 1951a | 1952a | % |
|---|---|---|---|
| | — | — | — |
| Bruselo ... ... ... ... | 448 | 523 | 116,7 ... ... |
| Antverpeno ... ... ... | 511 | 565 | 110,6 |
| Gento ... .. ... ... | 119 | 120 | 100,8 |
| Bruĝo ... ... ... ... | 264 | 220 | 83,3 |
| Charleroi ... ... ... ... | 47 | 35 | 74,4 |
| Verviers ... ... ... ... | 72 | 36 | 50,0 |

Estas do la Brusela Grupo Esperantista, kiu gajnis la premion per 116,7 % kaj kiu, dum la Kongreso en Antverpeno, ricevos la premion Antoinette Jennen.

Korajn gratulojn ni prezentas al la gajninta grupo, same kiel al tiuj, kiuj plibonigis sian procenton dum la jaro 1952a.

La aliajn ni alvokas al pli vigla laboro en 1953a, tiel ke ili ne nur plibonigu sian nunan procenton, sed almenaŭ reakiru la procenton, kiun ili havis jam en 1951a.

## ĜENERALA LAŬLEĜA KUNSIDO

La anoj de Reĝa Belga Ligo Esperantista estas petataj ĉeesti la jaran kunvenon, kiu okazos sabaton la 11-an de aprilo 1953, je la 17a horo, en « Brasserie St Martin », Place du Grand Sablon, 38, Grote Zavelplein, en Bruselo.

**Tagordo.**

1. — Raporto de la Administrantaro.
2. — Aprobo de la bilanco de la jaro 1952.
3. — Fiksado de la kotizo.
4. — Budĝeto 1953.
5. — Laŭstatutaj Elektoj.
6. — Diversaĵoj.

**Rimarko.** — La grupoj estas petataj proponi kandidatojn por la administrantaro. Grupanoj, kiuj ne povas ĉeesti la ĝeneralan kunsidon, povas anstataŭigi sin de alia membro, donante al li skriban ateston.

La Sekretario, J. SOYEUR.　　La Prezidanto, P. KEMPENEERS.

## ADMINISTRANTARA KUNSIDO DE REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA

La administrantaro kunsidis la 17-an de januaro 1953 en Bruselo.

**Financoj.** — La raporto de la kasistino estas aprobita. La financa situacio estas tre kontentiga.

**Membraro.** — Je la fino de la jaro 1952 la nombro de niaj membroj superas tiun de la antaŭa jaro.

**Fondaĵo Jennen.** — La premio estas atribuita al la grupo de Bruselo kiu akiris en la intergrupa konkurso kvocienton de 116 %.

**Belga Esperantisto.** — Oni decidis daŭrigi la sendon de la aldonoj « ES-SOR » kaj « DE ESPERANTIST ».

**Kongreso 1953.** — La aranĝoj jam fariĝaj tre bone disvolviĝas kaj oni povas antaŭvidi grandan sukceson.

**Unesko.** — Grava rezolucio favora al Esperanto estis alprenata en la Ĝenerala Konferenco de Unesko okazinta en Parizo dum novembro kaj decembro 1952. Tiu bela rezultato estas ŝuldata al Prof. LAPENNA, kiu plenumis tie tre grandan laboron.

**Gazetara servo.** — Dum la jaro 1952, la Ligo sendis 25 artikolojn al 70 gazetoj. Laŭ nia scio aperis 65 artikoloj en 15 gazetoj (8 franclingvaj kaj 7 flandrelingvaj).

La administrantaro denove kunsidos la 11-an de aprilo 1953.

La Sekretario.



# Literatura Konkurso

La Loka Kongresa Komitato de nia **Beneluksa Kongreso 1953a** organizas LITERATURAN KONKURSON kun premioj ĝis 1.500 Belgaj frankoj t.e. pli ol 100 Guldenoj, donacotaj de la tri Ligoj sub kies aŭspico kaj kun kies subteno okazos la Kongreso kaj la Konkurso.

La partoprenantoj ensendu :

a) originalan prozaĵon (maks. 3 paĝoj de « Belga Esperantisto » aŭ 3 kolonoj de « Flandra k. Nederlanda Esperantisto ».

b) originalan poezion (inter 10 kaj 100 versoj).

**Ĝeneralaj Kondiĉoj.**

1. Oni rajtas partopreni unu aŭ ambaŭ konkurs-partojn.

2. La manuskriptoj estu maŝinskribitaj en 3 ekzempleroj, je unu flanko de la papero.

3. Ili estu plejlaste la 30an de aprilo 1953a en la posedo de la sekretariejo de la L.K.K., Houwerstraat, 12, Antverpeno.

4. Ĉiuj premiitaj ensendoj estos la propraĵo de la L.K.K., kiu rajtos aperigi ilin en « Belga Esperantisto », « Flandra Esperantisto » kaj « Nederlanda Esperantisto.

5. La L.K.K. fiksos la nombron de la premioj kaj de ilia sumo, laŭ la valoro de la ensendoj.

6. Ĉiuj partoprenantoj indiku sur sia manuskripto moton aŭ pseŭdonimon. Ilia nomo kaj adreso neniel montriĝu, krom en fermita koverto, sur kiu aperu la dirita moto aŭ pseŭdonimo.

7. La juĝantaro konsistos el komisiono, en kiu kunsidos S-roj H. Vermuyten (Belga kaj Flandra Ligoj) kaj A. J. Kalma (LEEN).

8. La rezultato de la konkurso estos komunikata, okaze de la kongresa « Kultura Horo » kaj krome en la tri supre cititaj organoj.

9. Rajtas partopreni nur la membroj de la koncernaj Ligoj : « La Estonto estas Nia », Flandra Ligo Esperantista kaj Reĝa Belga Ligo Esperantista, aŭ la abonantoj de ilia revuo.

10. Ensendoj, nekonformaj al la supraj reguloj, ne estos konsiderataj. Pri ĉiuj punktoj kiujn ne antaŭvidas la « Ĝeneralaj Kondiĉoj » sen-apele decidos la juĝantoj, interkonsente kun la L.K.K.

* * *

## MALAPERO

En nº 4-1952 de *Malgranda Revuo*, S-ro Stellan Engholm anoncas la ĉesigon de la eldonado de tiu periodaĵo. Li provis krei kulturan revuon en Esperanto, sed pruviĝis ke, malgraŭ dekjara persista, neofta sed konstanta kaj regula aperigo, la eldonaĵo ne sukcesis veki ĉe la esperantista publiko sufiĉan intereson por fariĝi vivkapabla. MR meritis pli bonan sorton — ĝia malapero estas perdo por la movado. Por ebligi al abonintoj, ke ili kompletigu sian kolekton kaj al aliaj interesuloj, akiron de bona kaj interesa legaĵo, la eldoninto disvendas sian provizon.

Kompletaj jarkolektoj 1948 - 4 num. - Fr. 40
1950 - 6 num. - Fr. 60
1951 - 4 num. - Fr. 60
1952 - 4 num. - Fr. 60

Nekompletaj kolektoj - Nº 3-4 1944 - 3-1946 - 1-3-4-1947 po Fr. 5.

Nº 1, 2, 3-1949 po Fr. 10.

Oni mendu tuj ĉe Belga Esperanto-Instituto, Oostenstr., 26, ANTWERPEN. Pĉk. Nº 1689.58.

# BELGA KRONIKO

ANTVERPENO

## Esperanto-Grupo « La Verda Stelo »

*(Poŝtĉeknumero : 726.54)*

La 21an de novembro S-ro H. Sielens parolis pri la diversaj organizaĵoj starigitaj post la lasta milito kaj kiuj celas fiksi la mondpacon. Kvankam la paroladisto disponis nur pri malmulte da tempo por pritrakti tian ampleksan temon, li bone sukcesis doni al la multnombra ĉeestantaro klaran ideon pri la evolucio kaj la realigo de tiuj organizaĵoj.

La 28a staris en la signo de la gajeco : La malgranda sed vigla sekcio LA KLOPODANTOJ, kies membroj parolas dum kaj post la kunveno nur esperantlingve, donis pruvon de sia lerteco. Kantoj, deklamaĵoj, skeĉoj aŭ raportoj plenigis la programon kaj havigis al la aŭdantaro bonhumorajn horojn. Partoprenis en la aplaŭdo : S-ro P. Peelman (kiu gvidis la programon kiel paroladisto kaj aktoro), F-inoj Cl. Peeters kaj E. Van der Weken, S-ino L. Bernaerts, Ges-roj Truyens, S-roj K. Ameryckx, J. Van Nereaux, A. Verhoeven kaj J. Verstraeten. Pro la sukceso, la Prezidanto esprimis la deziron ke estontece okazu pliaj tiaj vesperoj.

La 5a de decembro, la festmonato, estis enkondukata de Sankta Nikolaa festo kune kun la parolata ĵurnalo. Kiel kutime, la membroj vigle kunlaboris. La ĉefpunkto de la vespero estis forlotumado (aranĝita de F-ino H. Toussaint) de donacoj, kiujn kunportis multaj verdstelan(in)oj. La bonhumoro kreskis kaj ĉiuj miris je la fino, ke estis ja pli malfrue ol kutime.

Solena festo iĝis la Zamenhofa vespero la 12an. Antaŭ bele ornamita fotografaĵo de nia Majstro, S-ro Maur. Jaumotte per trafaj vortoj grandlinie memorigis la vivon kaj la agojn de la elpensinto de Esperanto kaj voĉlegis artikolon aperintan en « Belga Esperantisto ». S-ro K. Ameryckx deklamis kaj kantis; F-ino E. Van der Weken citis partojn noblajn el kongresaj paroladoj de D-ro Zamenhof; S-ro P. Peelman legis kaj F-ino H. Holkens parolis pri « D-ro Zamenhof kiel poeto »; S-ro J. Verstraeten prelegis kaj deklamis kaj S-ino R. Lecat donacis al la grupo desegnitan portreton de nia Majstro. S-ro G. Van den Bossche flegis la ĉiujaran librovendon.

La 19an, S-ro K. Ameryckx aranĝis amuzan vesperon al kiu kunlaboris S-ro G. Van den Bossche per vortproblemoj (okaze de kiu S-ro J. Vinck sin rimarkigis pro sia sperteco), la F-inoj Joanna kaj Maria Ameryckx (per franca popoldanco, akompanata je la pianoforto de F-ino Cl. Peeters), Ges-roj Truyens kaj S-ro P. Peelman (kiuj aŭdigis trinkkantojn) kaj S-ro Dillis (kiu ludis kelkajn melodiojn). S-ro J. Van Nereaux je la pianoforto akompanis diversajn numerojn.

La 26an ne okazis kunveno ĉar la sekvonta tago, sabate, okazas la kristnaska balo. Gaja muziko kaj tombolo akirigis la atmosferon kune kun la bele ornamita kaj lumigita kristnaskarbo. Flanke de la dancemuloj prizorgis la programon : F-inoj L. De Winter, H. Toussaint kaj S-ino L. Bernaerts (en amuzega parodio el la malnova tempo) kaj F-ino H. Holkens, S-roj P. Peelman kaj K. Ameryckx (en malgranda, sed tamen sprita skeĉo). F-inoj F. Meulemans kaj Cl. Peeters prezentis belan, kvarmanan muzikaĵon je la pianoforto. Tiu ĉi festo estis bela konkludo por la jaro 1952a.

Dum la unua kunveno en januaro 1953 krom la bondeziroj de la Prezidanto al la membraro, okazis la parolata ĵurnalo al kiu diversaj membroj kunlaboris.

La 9an, S-ro J. Vinck kaj W. Vingerhoets (junaj, novaj membroj) parolis pri la sportludo « Base Ball ». S-ro R. Van Eynde donis enkondukajn klarigojn antaŭ ol la paroladistoj, kiuj estas aktivaj ludantoj, laŭvice, detale klarigis la funkciadon kaj la regularon, tiel la ĉeestantoj akiris helpe de demonstracioj kaj desegnaĵoj, pli bonan ideon pri tiu nova sporto. Prezidanta dankvorto kaj aplaŭdo de la ĉeestantoj certe instigos la du junajn elementojn por prizorgi estonte aliajn vesperojn.

La 16an okazis la ĝenerala jarkunsido : Voĉlego de la raportoj de sekretario kaj



kasisto kaj ĝenerala kora vorto de la Prezidanto por danki ĉiujn kiuj kunlaboris al la kreskigo de nia grupo, plenigis la unuan parton de la vespero.Dum la dua parto, pluraj membroj estis honorigataj per medaloj aŭ aldonaj steletoj pro 30-25 aŭ 20 jara fidela membreco : S-ro E. De Coster, kiu ricevis unu arĝentan steleton ĉe la arĝenta medalo; S-inoj A. Bolsius kaj L. Merckx, D-ro A. Christiaens akiris la arĝentan medalon anstataŭ la bronza; S-ro H. De Hondt ricevis duan steleton ĉe sia bronza medalo. Por ĉiuj la Prezidanto havis specialan spritan kaj amikan vorton kaj en la plej harmonia sfero finiĝis tiu kunsido.

Dimanĉe la 18an en la restoracio de la aviadila stacio, la verdstelanoj havis sian ĉiujaran bankedon. Je la 5a h. posttagmeze, bonhumoraj membroj kun gajaj vizaĝoj sidis ĉirkaŭ la tablo kaj gustumis la manĝaĵojn. Paroladis : S-ro Maur. Jaumotte kiel Prezidanto de La Verda Stelo, S-ro Castel kiel reprezentanto de la Brusela Grupo, D-ro P. Kempeneers kiel vic-prezidanto de U.E.A. kaj S-ro J. Verstraeten kiu honorigis la sinjorinojn en la personoj de S-ino H. Schoofs kaj S-ino Marg. Jaumotte al kiuj belaj floroj estis donacataj. La kabareda parto estis prizorgata de la teatra sekcio; sin speciale rimarkigis S-ino L. Bernaerts kaj S-roj K. Ameryckx kaj P. Peelman en la skeĉo « 25jara Jubileo ». Ankaŭ la gejunula dancgrupo montris sian lertecon per tre ŝatata demonstracio. Ĝenerala danca parto al kiu partoprenis ĉiuj ĉeestantoj konkludis tiun rimarkindan festenon en plej agrabla atmosfero.

La lundon postan, la 10an, la nova printempa elementa kurso komenciĝis : S-ro Maur. Jaumotte denove funkcias kiel profesoro. 42 gelernantoj enskribiĝis. Samtempe ekzameno okazis por la gelernintoj de la vintra kurso : 20 gekursanoj sukcesis al kiuj estis disdonataj la diplomoj dum la posta vendreda kunsido.

Akiris la diplomon pri elementa kapableco : S-roj Van Gompel K.; Vingerhoets W.; Broeckhoven H., Leys Arm.; F-ino Verschaeren M.; kaj F-inoj Van Coppenolle M., kaj Van Eetvelde M.; S-roj Van der Maat G. kaj Verstappen G.; F-ino Saveniers, M.; S-ino Truyens E.; F.-inoj Vinck Lea; Volant Yvonne; Johnson, A. kaj S-ro Reniers Fl.; F-ino Merckx J.; S-roj Janssens Lode kaj Verschueren Aug. El antaŭa kurso, partoprenis la ekzamenon kaj ankaŭ akiris la diplomon: S-ro Dillis; dum, ne sekvinte kurson sed bone sin preparinte, ankaŭ brile sukcesis : F-ino Paula De Ketelaere. Varma alvoko al la gediplomitoj fare de la Prezidanto Maur. Jaumotte enkondukis tiun solenan vesperon. S-ro W. Vingerhoets nome de la gelernintoj afable dankis sian profesoron, S-ron Maurice Jaumotte, dum S-ino Truyens donacis al li du belajn librojn kun kovrilo. Al S-ino Marg. Jaumotte ankaŭ freŝaj floroj estis transdonataj de F-ino L. Vinck. S-ro J. Verstraeten, nome de la komitato, dankis la Prezidanton kaj tiu respondis laŭ sia sprita kaj bonhumora maniero. Al la 2a parto de la vespero, kiu havas kabaredan aspekton, kunlaboris : S-ro K. Ameryckx per kantoj, S-ino Denayer kaj S-ro A. Verhoeven per deklamaĵoj, F-inoj P. De Ketelaere kaj M. Hofkens voĉlegis.

Lundon, la 26an S-ro Mor. De Ketelaere rekomencis la perfektigan kurson.

Vendredon, la 30an, pro la striko de la tramoj, ne okazis kunsido, por kiu tamen ok gemembroj kun-venis !

## Programo de la venontaj Kunvenoj :

Ĉiuvendrede en « Witte Leeuw », Frankrijklei, 4 je la 20a 30 h.

*Februaro* : la 20an : Legado el la libro : « Miru, Pensu, Ridu »; la 27an : Parolado de Sro Theo Van Gindertaelen, komitatano de U.E.A. kaj reĝa vicprokuroro en Mehleno, pri « La psikologio de la Murdo ».

Marto (memorigo) : la 6an : parolata ĵurnalo; la 13an : kabareda vespero de « La Klopodantoj »; la 20an : diskutvespero; la 27an : amuza vespero.

Aprilo : la 3an (Sankta Vendredo) Parolata ĵurnalo, kiun antaŭiras intima Skta.Vandreda manĝo; la 10an : la pro la tramstriko prokrastitaj filmoj de Sro R. Van Eynde; la 18an (sabaton) : Printempa Balo; la 24an : Parolado de S-ro Roger Jaumotte.

*Majo* : Vendredon la 1an, festotago, unua ekskurso de la jaro; la 8an parolata ĵurnalo; la 15an : Amuza vespero; la 22an : Kon-

gresaj preparoj aŭ kongresa atmosfero: la 23-24-25ajn : Beneluksa Kongreso; la 29an : Raportoj pri la Kongreso.

## FAMILIA KRONIKO

### Naskiĝo.

Novan membron akiris « La Verda Stelo », plian infanon ge-roj Thibau-Toussaint, neporn G-roj Toussaint, nevelon F-ino Henriette Toussaint kaj S-ino Bernaerts, per la naskiĝo de Hugeto Thibau.

Al gepatroj, geavoj kaj onklinoj, ĉiuj gemembroj de « La Verda Stelo », ni prezentas niajn plej korajn gratulojn.

### Funebro.

Pro la morto de lia fratino, ni prezentas sincerajn kondolencojn al S-ro Verhoeven kaj al lia edzino, ambaŭ membroj de « La Verda Stelo ».

BRUĜO

### Bruĝa Grupo Esperantista.

*(Poŝtĉeknumero : 48.35.33)*

Dum la kunveno de la 8a de Decembro estis farata speciala prezento de la grupa biblioteko. Pluraj ĉeestantoj prunteprenis libron por legado kaj la novaj membroj subskribis la « Oron Libron ». La 16an de Decembro okazis la lasta leciono de la elementa kurso, post kiu la prezidanto faris alvokon por daŭra praktikado de la lingvo. Ekzameno pri unuagrada lernado okazis la 23an kaj poste debato pri la demando « Ĉu edzino devas labori eksterhejme ? ». La rezultoj de la ekzameno estis proklamataj la 30an jene : Sro De Scheemaecker 93½% ; Sro Lenoir 92 %; F-inoj Herreweghe kaj Van Belleghem, ambaŭ 80 %. La laŭreatoj ricevis Esperantan insignon atendante la diplomon. La nova grupa jaro komenciĝis la 6an de Januaro per gaja festado de la Tri Reĝoj. Sro Van Cleven trafis la fabon el distranĉita kuko kaj estis kronata kiel reĝo; siavice li kronis kiel reĝinon F-inon Yv. Poupeye. Le ĝenerala jarkunveno okazis la 13an de januaro kun multaj ĉeestantoj. Post la legado de la oficialaj raportoj, kiuj estis aprobataj per aplaŭdoj, la Komitato estis unuanime reelektata: ĝi konsistas do el : S-roj Ch. Poupeye, Groothaert, Verplancke, Demeulenaere, F-inoj Boereboom kaj Is. Van Parys, (Sro C. Braet kiu estis komitatano dum 1952 kaj loĝas nun denove en Kongolando, ne estis anstataŭata). La 20an de Januaro, Sro De Scheemaecker, lerninto de la jus finiĝinta kurso, faris bonegan paroladon pri « La origino de la Sonorilaroj ». Poste okazis gaja portretludado. Sep gemembroj, inter kiuj du novuloj, nome Sro Marcel Poupeye kaj F-ino Van Belleghem, agrabligis la vesperon de la 27a de januaro per interesaj kaj plejparte amuzaj rakontoj pri propraj travivaĵoj.

*Programo de la venontaj kunsidoj :*

Ordinara kunveno : ĉiumarde je la 20a. en la sidejo « Gouden Hoorn-Cornet d'Or » Simon Stevinplaats.

Dum ĉiu kunveno iu membro prezentos malgrandan paroladon.

*Marto* : 3an : Parolata gazeto — 10an : Debato « Nia klimato aŭ alia » — 17an : « Leksikon »kartludado — 24an : Humoraĵoj — 31an : Portretludado.

*Aprilo* : 7an : Parolata gazeto — 14an : Debato « Por aŭ kontraŭ alkoholaĵoj » — 21an : « Leksikon »kartludado — 28an : Humoraĵoj.

## EL LA ESPERANTISTA FAMILIO

### *NEKROLOGO*

Al F-inoj Jeannine HINDERYCKX kaj Lucienne VAN BELLEGHEM, du novaj membrinoj de la Bruĝa Grupo, kiuj ambaŭ dum Januaro 1953 perdis amatan avinon, ni prezentas sincerajn kondolencojn.

BRUSELO

### Esperantista Brusela Grupo.

*(Poŝtĉeknumero : 12.30.48)*

La monato decembro estis enkodukata per la parolata ĵurnalo; multnombra estis la partopreno. La 1-an de decembro S-ro Vander Stempel akiris la plej altan poentnombron, kaj S-ro Castel gajnis la konkurson la 5-an de januaro. La 24-an de novembro kaj la 12-an de januaro D-ro Kempeneers agrabligis la vesperojn per montrado de filmoj. Denove ni povis travivi kelkajn landajn kongresojn kaj ankaŭ kelkajn internaciajn. Tamen ankaŭ la kolorfilmo pri la abelbredado kaj tiu pri la belega vojaĝo al Alĝerio treege plaĉis al ĉiuj ĉeestantoj.



La monato decembro estis vera festmonato, ne malpli ol 4 festoj okazis. La 7-an la Sankta Nikolaa-festo, kiu estis granda sukceso, kaj nia danko iras al ĉiuj organizantoj, kaj speciale al niaj senlacaj kaj ĉiam helpemaj samideaninoj S-inoj Plyson kaj Weyn. Dankon meritas ankaŭ S-ro Oleffe, kiu kiel pasintjare ludis sian Sanktan Nikolaan-rolon, kaj Ges-roj Kempeneers, kiuj alimaniere multe kontribuis al la sukceso de tiu vespero. Multaj gesamideanoj respondis al nia alvoko, kaj ĉeestis la intiman feston, kiun ni speciale okazigis por la infanoj de niaj membroj. Kun ruĝaj vangoj kaj grandaj okuloj sidis 12 etuloj en la unuaj vicoj, kaj atendis la okazontaĵojn. Kaj ili ne estis seniluziiĝintaj. Post kantado, la 10-jara knabo Yves ludis marŝon sur akordeono, kaj poste ni alvokis Sanktan Nikolaon per komuna kanto. Li alvenis en granda ornato, kaj li transdonis ceremonie la donacojn destinitajn por la infanoj, kiuj por ĉiu infano konsistis el ludilo, ĉokolado, bonbonoj, biskvitoj, ktp. Kiel decis al Sankta Nikolao li sidiĝis meze inter la infanoj, aŭskultante la manpupteatraĵon, kiun ludis S-ro Jirousek kaj S-ro Weyn. Estis prezentado speciale adaptita al la cirkonstancoj. La malgrandaj infanoj multe ĝuis la teatraĵon kaj la grandaj ĝojis pri ilia plezuro. Nia 10-jara akordeonisto esprimis sian dankon al Sankta Nikolao per tre bone ludita valso. Intertempe fariĝis la horo por trinki kafon kaj kakaon kaj manĝi bongustajn kukojn. Servemaj manoj rondiris kun kafo- aŭ kakaokruĉoj kaj regis ĝenerala bonhumoro, kiam por fini la vesperon la diskoj invitis la gedancistojn al valso kaj boogy-woogy.

La 13-an okazis nia Zamenhofa vespero. Ĉe tiu okazo S-ino Staes donacis al la grupo portreton de D-ro Zamenhof, desegnatan de S-ro Lecat kaj enkadrigitan de S-ro Weyn. S-ro Vander Stempel enkonduke pianludis. Poste la prezidanto D-ro Kempeneers direktis sin al la gesamideanoj, kaj skizis vivantan bildon de D-ro Zamenhof, de lia vivo kaj de liaj verkoj. Kun trafaj vortoj la parolinto sukcesis krei la ĝustan atmosferon. Tiam S-ro Jacobs legis du spritajn rakontetojn de Hendriko Fisher. La unua parto de nia programo finiĝis en komuna kantado de « Tagiĝo », akompanata de S-ro Vander Stempel. Post la paŭzo S-ro Vander Stempel interpretis al ni duan muzikverkon kun la sama sukceso ol antaŭe, kaj poste S-ro Verdier legis versaĵojn de Jean Prevert, tradukitajn de li mem. Estis ankaŭ S-ro Verdier, kiu plenumis la rolon anonci la programerojn kaj enkonduki la rolantojn. Nun estis la vico de S-ino Ernst, kiu deklamis la « Preĝo sub la verda Standardo », kiun poemon ŝi enkondukis per legado de parto el la kongresparolado de D-ro Zamenhof en Bulonjo sur maro. Sed la granda sukceso de la vespero estis la « Radio-disaŭdigo » pri la vivo de nia majstro, prezentata de S-ino Weyn, S-roj Castel kaj Jirousek. La teatraĵeto estis akompanata de adaptita pianludado de S-ro Vander Stempel. La tuta programo de tiu vespero estis zorge elektita, kaj povas esti rigardata kiel plena sukceso. Ĉiuj partoprenantoj rikoltis laŭtan aplaŭdon. En komuna kantado de la himno finiĝis ĉi tiuj Zamenhofaj rememorhoroj.

La 22-an okazis Kristnaskfesto. Tiu festo estis la plej multnombre vizitata de la jaro. La salono estis preskaŭ tro malgranda. Meze en la salono staris bele ornamita arbo, kaj ĉirkaŭ kaj sub la arbo troviĝis la zorge envolvitaj donacoj de la gesamideanoj, kiuj ne forgesis alporti ian surprizon. Sur la tabloj troviĝis multkoloraj kandeloj. Kiam la elektra lumo estingiĝis kaj nur la kandeloj brulis, fariĝis tre intime. Ĉiuj kantis la tiel konatan kaj belan « Sankta Nokto » kaj en la salono disvastiĝis la odoro de la brulantaj kandeloj, kiu tiel harmonias kun la kristnaskatmosfero. Pere de diskoj oni zorgis pri la gajeco. F-ino Gisèle Oleffe kaj S-ro Jirousek prezentis tre amuzan dialogon. F-ino Nicole Oleffe regalis nin per akordeonludado. Finfine venis la granda momento : la donacoj estis numeritaj, kaj ĉiuj gesamideanoj devis preni el skatolo numeron kiu konkordiĝis kun unu el tiuj, kiuj estis sur la paketoj. Tiel ĉiuj havis surprizon, kaj regis tre gaja kaj bona animstato. La vespero finiĝis en dancvespero kaj nur malfrue ni disiĝis kun la agrabla sento, ke oni pasigis belan vesperon inter geamikoj. D-ro Kempeneers dankis per varmaj vortoj al Gesroj Weyn kaj S-ino Plyson, kiuj tiel multe kontribuis al la sukceso de tiu festo.

Por fini la jaron 1952 ni organizis la 29-an

agrablan, intiman kuneston ĉe mituloj kaj frititaj terpomoj. Ĉeestis 55 gesamideanoj. La vespero pasis en gajeco multe tro rapide, kaj je la dekunua horo ni disiĝis kun la agrabla sento ke nia lasta monato estis unu el niaj plej bonaj.

La 18-an de januaro bruselaj gegrupanoj havis la grandan plezuron ĉeesti en Antverpeno belan feston kun kabaredo, organizitan de « Verda Stelo ». La festeno okazis en la restoracia salono de la Aviadila Stacio, kie la bruselanoj ĝuis la amikan akcepton de la karaj antverpenaj samideanoj.

La 26-an de januaro 1953 okazis la ĝenerala jarkunveno de nia sekcio, dum kiu la malnova komitato estis deŝarĝata de siaj funkcioj kaj la nova komitato elektata. La nova komitato konsistas el 7 membroj, nome : S-ro Castel, S-ino Ernst, S-ro Jacobs, S-ro Jirousek, S-ro D-ro Kempeneers, S-ino Plyson, S-ino Weyn. La helpkomitato : S-ro Jacquet, F-ino Kestens, S-ro Oleffe, S-ino Staes, S-ino Stern, S-ro Vander Stempel kaj S-ro Van Geydt.

*Programoj de la estontaj kunsidoj :*

Ĉiulunde, je 20.30 h. Ejo : Brasserie St. Martin, Place du Grand Sablon, 38, Grote Zavelplein.

*Februaro.* — La 9-an, S-ro Swinne : Oro kaj paco ?; la 16-an, S-ro Vander Stempel, perfektiga kurso; la 23-an, S-ino Stern : Richard Wagner kun diskoj.

*Marto.* — La 2-an, parolata gazeto; la 9-an, S-ino Ernst, Priparolado de nov-aperinta libro; la 16-an, S-ro Vander Stempel, perfektiga kurso; la 23-an, Sino Castel manĝigos karnavalkukojn; la 30-an, F-ino Kestens, Nova promenado tra malnova Bruselo.

*Aprilo.* — La 6-an, paska lundo : ne okazos kunsido; la 13-an, parolata gazeto; la 20-an, S-ro Vander Stempel, perfektiga kurso; la 27-an, Mad. Lefebvre : « Oni ne senprepare fariĝas paroladisto ».

*Majo.* — La 4-an parolato ĵurnalo; la 11-an, S-ro Castel parolos pri Popolpoezio kaj pri la hispana poeto G. A. Becquer (1837-1870); la 18-an, perfektiga kurso de S-ro Vander Stempel; la 23, 24, 25-ajn, partopreno en la Beneluksa Konkreso en Antverpeno.

VERVIERS

**Esperantista Grupo Verviers.**

Tuj kiam dum decembro ni sciiĝis pri la decido alprenita ĉe l'U.N.E.S.K.O., ni deziris komuniki ĝin al la publiko kaj alinteresigi la geinstruistaron de la regiono, kun la celo krei kadrojn por la estontaj kursoj. Tiucele estis organizata sabaton 31an de januaro, en la salono de la « Conservatoire de Musique », senpage disponigita al ni de la skabenaro, propaganda parolado kun titolo : « La nuna situacio de Esperanto en la Mondo ».

Samtempe, ni ekspoziciis imponan kvanton da literaturaj libroj kaj turismaj broŝuroj. Ni sendis 300 invitilojn, laŭ listoj de la geprofesoroj kaj instruistoj afable komunikitaj al ni de la lernej-inspektoro de la urbo.

Bedaŭrinde, la elektita vespero estis ĝuste tiu de la terura neĝ-ŝtormo, kiu falis sur nian regionon kaj kaŭzis ĉe la marbordo la teruran katastrofon kiun ĉiu konas. Kaj tiu rezultigis malmultnombran ĉeestantaron ĉe nia kunveno. La parolanto estis S-ro D-ro Pol Denoël, el Liego, esperantisto jam de la frua junaĝo. Dum pli ol unu horo, li tenis la publikon katenitan pro siaj agrabla dirmaniero kaj interesa temo. Ĝenerala debato sekvis kaj estis tre profita por ĉiuj. Li estis prezentita kaj dankata de la Prezidanto S-ro Hérion, kiu bedaŭris la forreston de la geinstruistoj speciale invititaj. Senditoj de la du plej gravaj ĵurnaloj enurbaj ĉeestis kaj raportis per longaj kaj objektivaj raportoj. Ni disdonacis propagandajn kaj turismajn flugfoliojn; kelkaj ĉeestantoj provizis sin per lern-libro kaj unu profesoro kaj lia filino postulis apartan kaj rapidan kurson por ili ambaŭ : kio estis tuj reguligita. La urbestro kaj la skabeno estis perfetere senkulpiĝintaj pro neebla ĉeesto.

Je tiu okazo, ni sukcesis regajni al la movado kelkajn malnovajn samideanojn kaj tio serioze influas nian nunan membroliston. La grupo reorganiziĝis kun jena komitato : prezidanto Jos. Hérion; vic-prezidanto Jean Kairis; sekretario Léonard Lenzen; kasisto Toussaint Demarche. S-ino Elhen estos la delegitino ĉe la ĉiutagaj ĵurnaloj. La kunvenoj okazas ĉiujn unuan kaj trian merkredojn en la monato ĉe « Café du Vieux-Brasseur », rue Xhavée, je la 20a.



# La 38a en Zagreb

El la oficialaj komunikoj :

**Adreso :** 38a Universala Kongreso de Esperanto, Poŝtfako 213, Zagreb.

**Kotizoj :** De la komenco de tiu ĉi jaro la pli alta kategorio de kotizoj validas. La L.K.K. denove sciigas ke la lasta dato por kongresaliĝoj estas la 30a de junio. Aliĝoj venontaj post tiu dato estos malakceptataj.

**Fakaj kunsidoj :** Fakaj asocioj estas petataj jam nun anonci sin kun detaloj pri salono kaj nombro de eventualaj partoprenontoj.

**Karavanoj :** Aranĝantoj de karavanoj nepre tuj kontaktu la LKK por ricevi detalojn kaj instrukciojn.

**Subvencio :** La Registaro de la Kroatia Respubliko asignis al la kongreso la sumon de 500.000 dinaroj.

**Junularo :** En Podlabin, Esperanto estas devige instruata al 114 infanoj 10-14 jaraj, inter kiuj estas 30-membra orkestro de « tamburic » (nacia instrumento). Loka karbmina entrepreno subtenas tiujn gejunulojn kaj promesis ebligi al ĉiuj la aliĝon kaj partoprenon al la kongreso. L.K.K. tial urĝe petas, ke granda nombro da gejunuloj venu al Zagreb. L.K.K. preparos specialan programon por la junularo.

* * *

**Ni rememorigas al la personoj, kiuj deziras partopreni la 38an Universalan Esperanto Kongreson en Zagreb, ke la kotizoj, ĝis la 31a de Marto 1953, estas : Por la Kongresano : 340 belg. fr.; por la edzino 170 belg. fr.; por la junuloj malpli ol 20jaraj : 120 belg. fr.**

**Por la individuaj membroj de U.E.A., la kotizoj estas respektive : por la kongresano 300 blg. fr.; por la edzino 150 belg. fr.**

**Oni povas aliĝi al la Kongreso pere de Reĝa Belga Ligo Esperantista, kiu estas la peranto por Belgujo; oni ĝiru la kotizon al postĉekkonto 13.37.67 de Reĝa Belga Ligo Esperantista, Bruselo.**

# Bibliografio

*La Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj*, tradukita de R. L. Harry, de la Departamento de Eksterlandaj Aferoj, Canberra, Aŭstralio. 60 paĝa, hektografita broŝuro.

*HAMBURG (Germanujo)* : Jen nova prospekto eldonita de la Turistasocio de la Hansa Urbo Hamburgo, entute en esperanta lingvo, kun multaj plaĉaj fotografaĵoj kaj klarigoj pri la precipaj vidindaĵoj. La adreso de la

## KOORDINATAJ KURSOJ

De la fino de Oktobro 1952, F-ino OBOZINSKI gvidas elementan kurson de Esperanto ĉe la Ateneo Robert Catteau, en Bruselo, sub la patronado de la urbaj instancoj. Tiu kurso estas starigata sekve de la propono de S-ino D-ro PETER-RUETSCHI el Zurich, kiu organizigis « koordinatajn kursojn de Esperanto » en kiel eble plej nombraj landoj. Tio signifas ke, samtempe, en diversaj lokoj, la gelernantoj (plenkreskuloj de, ĉefe, popolaj universitatoj) ricevus lecionojn laŭ speciala, sama plano; tiamaniere, post kelkaj semajnoj, la gelernantoj povus komenci korespondadon.

La kursgvidantino ricevis listojn (kun nomo, aĝo, adreso, profesio, temo dezirata) de eventualaj gekorespondantoj el : Firenze, Helsinki, Karlstad (Svedujo), Kopenhago, Manchester, Parma, Parizo, Salzburg, Stuttgart, Zurich. Ŝi sendis la liston de siaj gelernantoj (ĉiuj, krom unu, **inoj**) al la profesoroj de la supre menciitaj urboj. La interkorespondo jus komenciĝas, estas do ne eble doni jam rezulton, sed ŝajnas ke tio interesas la gelernantojn, kiuj sekvas regule la semajnan kurson.

## ATENTU

**Pro manko de loko, diversaj rubrikoj estas prokrastitaj ĝis la proksima numero i.a. : « Paŝo post Paŝo ». « Ĉu vi scias », kuriozaĵo (respondo), humoraĵoj, k.t.p.**

eldoninta asocio estas : Lombardsbrücke, 1, Hamburg 1.

*LLAVE DEL ESPERANTO* estas la hispana titolo de la nova « ŝlosilo » eldonita de U.E.A., interkonsente kun ĉiuj la landaj asocioj de Hispanujo kaj hispanlingvaj sudamerikaj landoj.

*PADOVA kaj ĝia Foiro*, estas la titolo de beleta broŝureto, eldonita de « Fiera Internazionale di Padova », kiu enhavas artikoletojn pri la historio de la itala urbo kaj pri la vizito de la vidindaĵoj.

*KÖLN (Germanujo)* : Kontraŭ du respondkuponoj, sendotaj al « Esperanto-Societo Köln-Mülheim, Kniprodestr. 19, Köln, ĉiu povas ricevi grandan planon de la fama urbo, kun germana teksto ja, sed al kiu estas aldonata libreto kun ĉiuj informoj pri 116 konstruaĵoj, montritaj sur la plano. Tiuj ĉi klarigoj estas laŭvice donataj en germana, angla kaj esperanta lingvoj.

*ZAGREB (Jugoslavio)* : Okaze de la estonta universala Kongreso, la L.K.K. de Zagreb eldonis faldfolion, kiu enhavas bonvenigan vorton al Zagreb je la granda jarfesto de la 25a de julio ĝis la 3a de aŭgusto 1953a. Ĝi donas klarigojn pri Jugoslavujo ĝenerale kaj pri la kongresurbo, de kiu detala plano estas aldonata.

*

*Esperantlingvaj resumoj en medicinaj gazetoj*

Ni ricevis ekzemplerojn de « L'Igiene moderna », bela revuo publikigata de Istituto d'Igiene, Viale Benedetto XV, Genova, Italujo.

Kun plezuro ni vidis en ĝi esperantlingvajn resumojn de la artikoloj. Espereble la presejo baldaŭ disponos pri la kelkaj matricoj necesaj por la presado de la akcentitaj literoj. Ni rememorigas ke aliaj medicinaj revuoj inter ili « Journal de Médecine de Lyon » kaj « Acta Orthopaedica Belgica » jam delonge regule presigas esperantlingvajn resumojn.

*

*L'ARC EN-CIEL*, organo de Union Fédérale du Mouvement Universel pour une Confédération Mondiale, 3, Passage des Postes, en Bruselo, citis la nomon de D-ro Edmond Privat, rektoro de la Neufchâtel'a Universitato en raporto farita pri la 2a Konferenco en Londono pri la temo : La Monda konsilantaro por la Stariĝanta Unuiĝo de la Popoloj.

## Radio

La nova programkajero de la svisa mallongonda radiostacio por la tempo ĝis la 30-a de aprilo aperis. La disaŭdigoj de profesoro Privat kaj doktoro Baur, okazas je la sama tempo kaj sur la samaj ondolongoj kiel en la somero; do marde kaj jaŭde je 12.55 kaj 18.35. La adreso estas : Svisa Mallongonda Radiostacio, Neuengasse 23, Bern.

La horoj indikitaj estas tiuj de la mezeŭropa tempo.

| | | |
|---|---|---|
| Lunde : | | |
| 19.00-19.30 | Rabat | 482 m. |
| Marde : | | |
| 1.45- 2.00 | Bauru | 91 m. |
| 12.55-13.00 | Bern | 16.9, 31, 48.7 m. |
| 18.35-18.40 | Bern | 19.6, 31, 48.7 m. |
| 23.15-23.30 | Guatemala | 49 m. |
| Merkrede : | | |
| 19.00-19.20 | Roma | 25.2, 31.4, 49.9 m. |
| 20.30-21.00 | Madrid | 42.5, 225 m. |
| 22.35-22.40 | Wien | 513, 25.5, 48.7 m. |
| Jaŭde : | | |
| 9.30- 9.45 | Paris | 218 m. |
| 8.35- 8.40 | Lille | 348 m. |
| 12.55-13.00 | Bern | 16.9, 31, 48.7 m. |
| 18.35-18.40 | Bern | 19.6, 31, 48.7 m. |
| Vendrede : | | |
| 19.00-19.20 | Roma | 25.2, 31.4, 49.9 m. |
| 23.15-23.30 | Hilversum | 188, 208 m. |
| Sabate : | | |
| 9.30-10.00 | Rio de Janeiro | 30.7 m. |
| 23.15-23.40 | Hilversum | 402 m. |
| Ĉiun duan lundon : | | |
| 23-15-23.40 | Hilversum | 402, 188 m. |
| Ĉiun duan mardon : | | |
| 16.00-16.15 | Wien | 203, 25, 30, 41, 48 m. |

*

La paco postulas la ordon.
La ordo postulas la leĝon.
La leĝo postulas la regon.
La Universala Paco postulas universalan regon.

(Lord Beveridge).

Membriĝu al « Union Fédérale », s.s.p.c., belga sekcio de la Mondmovado por Universala Konfederacio. Sekret. : 3, Passage des Postes, Bd Anspach, 3, Bruxelles.

LES ENTREPRISES
**DERKS**
226, Rogierstrato, BRUSELO
Tel. : 15.19.92
Entrepreno de
KONSTRUAĴOJ

Por viaj esperantaĵoj, libroj, insignoj k. c.
**Belga Esperanto-Instituto**
26, Oostenstraat, 26
ANTVERPENO
*kiu ankaŭ havigos al vi nacilingvajn librojn, revuojn kaj gazetojn, kaj ĉiuspecan skribmaterialon.*

BRUGGE BRUGES
**Hôtel du Cornet d'Or**
2, Simon Stevinplaats, 2
Centra situo - Moderaj prezoj
—— Moderna komforto ——
Sidejo de « Bruĝa Grupo Esperantista »
—— Tel. 314.59 ——

**G. FAES**
16, Schoenmarkt, 16
ANTVERPENO
—— Por via MUZIKO,
RADIO kaj GRAMOFONO

BELGA ESPERANTO-INSTITUTO, koopera societo.
26, Oostenstraat, Antverpeno.

Jus aperis :
D-ro IVO LAPENNA :
Aktualaj problemoj de la nuntempa internacia vivo :
Fundamentaj nocioj; lukto por la paco per juraj rimedoj; internaciaj organizajoj. — Prezo : 70 fr.

Ankaŭ ĉiujn aliajn Esperanto-eldonaĵojn oni povas mendi ĉe **Belga Esperanto-Instituto, 26, Oostenstraat, Antverpeno.**

Belga Esperanto-Instituto akceptas abonojn al eksterlandaj Esperanto-gazetoj.

**Verreries et Miroiterie DESMECHT & Co**
LA LOUVIERE S.P.R.L. Tel. n-roj 223.01 - 225.37
*Du esperantaj markoj :*
**TABULO**, por lernejtabuloj; **KATOKULO**, por signalvitroj.

VOJAĜAGENTEJO **ULTRA MONTES**
24, Koningin Astridplein, Antverpeno. — Tel. 32.76.15
17, rue d'Arenberg, Bruselo. — Tel. 12.55.02
ĈIUSPECAJ VOJAĜOJ AL ĈIUJ LOKOJ
— Vojaĝkartoj kaj rezervoj por Fervojoj, Aviadiloj kaj Ŝipoj. —

# REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA

ASOCIO SEN PROFITA CELO

*Prezidanto* : D-ro P. KEMPENEERS, 106, rue General Lotz, Uccle-Bruselo.
*Vic-Prezidanto* : S-ro M. JAUMOTTE, 44, avenuo De Bruyn, Wilrijk-Antverpeno.
*Generala Sekretario* : S-ro H. SIELENS, Houwerstraat, 12, Antverpeno.
*Sekretario* : S-ro Joseph SOYEUR, 91, rue du Chêne, Seraing.
*Kasistino* : S-ino J. PLYSON, 185, rue Jourdan, Saint-Gilles-Bruselo.

## KOMBINATAJ KOTIZOJ

## Reĝa Belga Ligo Esperantista kaj Universala Esperanto-Asocio

| | A. | B. | C. |
|---|---|---|---|
| I. *Simpla membreco* (enhavas membrecon al la loka Grupo — se ekzistas — al la Ligo kaj al la internacia organizaĵo; rajtigas ricevi la nacian gazeton « Belga Esperantisto » kaj la internacian kuponaron por servoj) ... ... ... . | 25,— | 50,— | 100,— |
| *Familia membro* (same, escepte la gazeton) ... ... ... | | | 50,— |
| II. *Membreco kun individua aliĝo* al la internacia organizaĵo : | | | |
| a) *Membro kun Jarlibro* : kiel simpla membro; ricevos krome la Jarlibron kaj ĝian aldonon ... ... ... ... ... ... | 75,— | 100,— | 150,— |
| b) *Membro Abonanto* : kiel membro kun Jarlibro; ricevas krome la monatan internacian gazeton « Esperanto » . | 165,— | 190,— | 240,— |
| c) *Membro Subtenanto* : kiel membro abonanto; pagas pli altan kotizon por helpi la movadon ... ... ... ... ... | 250,— | 275,— | 350,— |

III. *Bonfaranta Membro* memvole aldonas almenaŭ 25 fr. al sia kotizo, speciale por helpi al R. B. L. E.

Pagu al via loka grupo; se ne ekzistas, al poŝtĉekkonto 1537.67 de Reĝa Belga Ligo Esperantista.

A. Kadetoj (ĝis 18 j.); B. Junuloj (ĝis 21 j.); C. (21 j. kaj pli).

## BELGA ESPERANTO-INSTITUTO

Koopera Societo

D-ro L. L. Zamenhof, 1859-1917. Aŭtoro de Esperanto. — Reproduktaĵo sur poŝtkarto, de la bildo de nia Majstro pentrita kaj donacita al Internacia Esperanto-Muzeo, Wien, de artpentristo Ach. Bentos. Eldono « Esperanto », Oostenstr. 26, Antwerpen. Prezo : Fr. 2,—. La sama bildo estas havebla kiel vera fotografaĵo. Prezo : poŝtkartformato : Fr. 10,—; 24 x 30 cm., Fr. 65,—; 30 x 40 cm., Fr. 100.

Imp. Lielens, s. p. r. l., 18, rue de la Princesse, Bruxelles — Tél. : 21.10.98 — 21.87.90